# AMO 81: la tri tagoj resume

## AMO 81 unua tago

La 23an de decembro komenciĝis la 81a AMO-Seminario de UEA en Togolando, en la Instituto Zamenhof en Lomeo.  Dekkvaro da esperantistoj sekvis la seminarion en la unua tago.S-ro GBEGLO Koffi bonvenigis la partoprenantojn kaj disponigis la programon de la seminario. Ĉiuj ricevis siajn lernilojn (kajerojn kaj skribilojn).
13 togolandaoj kaj unu beninano ĉeestis  kaj okazis tri prelegoj.

La unua prelego estis pri la temo de la seminario : « Esperanto per Io, Io per Esperanto ».  Antaŭ ol eniri la lokan programon, s-ro Attago Kokou Evienyeame, per lumbildaro, prezentis la enkondukon de s-ro Stefan MacGill. Tiu ĉi menciis kion oni faras per Esperanto, listigante diversajn Esperanto-agadojn tra Afriko pri Esperanto serve al pli vastaj celoj, antaŭ ol fari rekomendojn.

Venis la vico de s-ro Gbeglo Koffi  prezenti sian tekston : 'Lernado de Esperanto per **io**, utiligi Esperanton por **Ion** fari konkrete'. Esperanto jam estas preta por esti utiligata en ĉiuj sferoj de la homa agado. Li invitas ĉiujn bone informi pri Esperanto, antaŭ ol instrui ĝin pli per rekta metodo ol per la gramatika. Poste prezentiĝis la asistanto kuracista, s-ro Kounke Yao Emileo. Li klarigis pri la malsano diabeto, menciante la simptomojn, manifestadon kaj kiel preventi ĝin.

S-ro Edah Gadoufia Kingslim prelegis pri 'La limoj de la homoj'. Li demonstris, ke  la homoj povos atingi ĉion, kion ili volas. Montriĝis, ke homoj, kiuj ne kapablas realigi tion, kion li planas, estas pigraj aŭ simple rezignas. Komprenindas, ke ĉion ajn, kion la homoj povas fari, necesas bone voli.  Aplaŭdoj kronis lian prelegon.

Koncizigita el raporto en EKO 57

## AMO 81 en Togolando – la dua tago

La subtemoj  tiutagaj (la 24a de decembro)  estis :

- Aplikado de Esperanto  en la ĉiutaga vivo de la homo
- Valoraĵoj kulturaj  niaj
- Esperantujismo
- Vojoj al sukceso
- Esperanto-organizaĵoj
- La bulonja deklaracio

S-ro GBEGLO Koffi enkondukis la subtemaron  La partoprenantoj rakontis kiel ili nun aplikas Esperanton en sia ĉiutaga vivo. El la rakontoj, oni povis noti la kutimajn aferojn, kiel interrilatado homa, uzado de Esperanto en familio, interŝanĝoj de ideoj, legado de libroj, partopreno en Eo-aranĝoj, aparteno al Eo-organizaĵoj, ktp. Neniu povis mencii, ke li akiris laboron pere de Esperanto, kvankam tio ja ekzistas en Togolando, ĉar pere de Esperanto estas dungita la unua pedagogia direktoro de Instituto Zamenhof. Tiam oni

rimarkis, ke abismo faŭkas inter Esperanto kaj dungebleco . S-ro Koffi emfazis, ke nun estas la momento krei laborojn pere de Esperanto. Eble la valoraĵoj kulturaj povos kontribui al tio.

S-ro SAGBADJELOU Kokou parolis pri la valoraĵoj kulturaj niaj. Afrikanoj, kiel aliaj popoloj, havas proprajn kulturaĵojn: manĝostilon, vestadon, nomprenon, ktp. Montriĝis, ke afrikanoj forĵetas siajn kulturaĵojn por adopti tiujn de aliaj popoloj. Li vekas la afrikanojn, ke iliaj kulturaĵoj estas VALORAJ. Ankaŭ Esperanto havas siajn kulturaĵojn.

Esperanto-organizaĵoj ekzistas multaj. S-ro KEDEGADZI Ezekiel prezentis Esperanto-Organizaĵojn : UEA, ILEI, SAT, La Esperanta Civito, MAS, TEJO, UMEA, IKEF, IFEF, UETA, ktp. Al kiuj el tiuj organizaĵoj apartenu esperantistoj kaj kiuj el ili zorgas pri Esperanto en Afriko ? Ĉu ne la Afrika Komisiono de UEA estas asocio de esperantistoj afrikaj ? Tiaj demandoj aperis dum la prezentado de la temo. Klarigoj abundis tiam de la prezentanto kaj ankaŭ de la partoprenantoj. Ĉiuj esperantistoj estas liberaj aparteni aŭ ne al Esperanto-organizaĵoj.



## AMO 81 la tria tago

La tago malfermiĝis per prezento de Mezotrofio (la kresko de ĉeloj en la homa korpo, greno-devenaj) kaj homa nutrado. S-ro Kouevigan Koffi Jerôme prelegis pri la lasta subtemo 'Kial lerni Esperanton. Lau li, la antauaj kialoj estis: interamikiĝo, komunikado, turismaj celoj, ktp. Laŭ li, la problemo pri komunikado jam solviĝs per la nuna stadio de la teknologio. Nun por solvi lingvan problemon oni povas uzi efikajn aparatojn. Oni devas alimaniere pensi pri la kialo de la lernado de Esperanto.

# AMO 81 konklude

Jen konkludojn el la seminario. Jen la rezulto, kiun ni iam komentos.

- Landoj asocioj estu (re)starigitaj en Afriko.
- Starigado de fakaj asocioj en Afriko aŭ penatrado de jam ekzistatajj.
- Esperanto estu ankaŭ fonto de ekonomiaj aferoj
- Intensigita estu la kunlaborado de afrikaj esperantistoj kun ĉiuj ajn
- Esperanto-Organizaĵoj internaciaj kaj ankaŭ kun neesperantistaj organizaĵoj
- Por la disvastigo de Esperanto en Afriko, ties anoj kalkulu pli je proprajfortoj/rimedoj ol je tiuj de aliaj homoj/organizaĵoj